

## HISTORIO DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-MOVADO 1952-1968

**František Sviták** – prelego en la seminario okazinta en la jaro 1971  
omaĝe al la 70-a jubileo de la Esperantista Klubo en Brno

### Periodo 1952-1958

Post la likvido de Esperanto-Asocio en ĈSR (6.9.1952), konekse kun leĝa novordigo de la societa vivo surbaze de t.n. amasorganizaĵoj, restis al ĉeĥoslovaka Esperanto-movado sen gvida centra organizaĵo. Sub la influo de malĝusta interpreto de la „Lingvaj demandoj“ de J. V. Stalin rilate al Esperanto, la esperantistoj estis flanke de ŝtataj organoj malprave kulpigataj pri kapitalisma ideologio de kosmopolitismo.

La ĝistiamaj lokaj grupoj kaj kluboj rajtis de tiam disvolvi limigitan agadon nur kiel „interes-rondetoj“ en la kadro de la klerigaj institucioj de Naciaj Komitatoj, de kulturaj kluboj de la Revolucia Sindikata Movado ĉe diversaj uzinoj k.s. Tiu ĉi ŝanĝo signifis gravan malkreskon de la aktiveco inter la esperantistoj kaj limigon de la antaŭa multflanka organiza kaj kultura laboro. Samtempe ĉesis preskaŭ ĉiu ajn publika eldon-agado kaj informado pri Esperanto en la gazetaro kaj radio.

En tiu ĉi malfavora situacio ludis gravan rolon tri faktoroj, kiuj en la ĉeĥaj landoj funkciis paralele kaj savis la kontinuecon de la movado. Ĝi estis la tiama vigla kaj kuraĝa junularo.

**Junularo** kun la ĉefa centro en Praha kaj poste en Opava organizis seninterrompe la laŭde konatajn Somerajn Esperanto-Tendarojn (SET) – en Žimrovice (apud la rivero Moravice), Chvalatice (apud la valdiga lago Vranov nad Dyjí), Popelná na Šumavě, Červená nad Vltavou kaj Lančov (ankaŭ apud Vranov nad Dyjí). Ĝi disvolvis sian agadon paŝon post paŝo tra la tuta lando kaj novaj grupoj fondiĝis en Třebíč, Lanškroun, Plzeň, Most k.a. Krom SET oni ĉiujare aranĝis grandajn tutlandajn renkontiĝojn, t.n. „Babiladojn“ (en Ostrava), pli poste eĉ balojn (en Brno), amase disvastigis Esperantajn kantojn kaj eldonadis propran gazeton (Tagiĝo, poste Fajrero). Tiamaniere edukiĝis multaj novaj esperantistoj kaj kreskis vico da kapablaj laborantoj, kiuj meritiĝis pri la ekzisto kaj nova disvolvo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado. Multaj el tiu ĉi generacio poste fariĝis elstaraj fakuloj kaj funkciuloj, kiel ekzemple la fratoj Drahomír kaj Vlastimil Kočvara, Vlastimil Novobilský, Jan Werner, Pavel Sittauer, Josef Cink k.a. En ĉi tiu medio naskiĝis ankaŭ du gravaj publikaĵoj: SKIZO PRI LA ESPERANTA LITERATURO (Novobilský) kaj RESUMA HISTORIO DE LA

ESPERANTO-MOVADO (Mařík), kiuj bone servis kiel instrumaterialoj en la Tendaroj kaj ceteraj Esperanto-kursoj.

Kiel la dua faktoro estas mencienda grava aktiveco, kiun disvolvis, de la jaro 1953, la ĉeĥoslovaka sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), sub la energia kaj ege oferema gvido de Rudolf BURDA en Plzeň, kiu estis kunfondinto de MEM (1953) kaj ĝia unua prezidanto. Dum kelkaj jaroj MEM eldonis stencilitan gazeton „PACDEFENDANTO“, sugestis al la ĉeĥoslovakaj esperantistoj internacian porpacan agadon kaj per tio ĝi samtempe akiris certagradan rekonon pri ilia peresperanta laboro. (Tamen k-do Burda – parte pro sia tro obstina naturo kaj konduto - plurfoje spertis flanke de oficialaj organoj seriozajn malagrabraĵojn).

La tria faktoro estis la Esperantista Klubo en Praha, gvidata de la prezidanto Jaroslav ŠŪSTR, samtempa ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu disvolvis vastan agadon, per kiu oni certagrade anstataŭigis la taskojn de la estinta Asocio. La klubo, kiu laboris kiel interes-rondeto ĉe la Kleriga centro (*Osvětová beseda* en Praha 2), eldonadis stencilitan BULTENON (1953-1965), kies redaktoro kaj pretiganto ĝis la jaro 1958 estis Josef VÍTEK (Praha). La BULTENO aperadis komence en la eldonkvanto de 500, poste eĉ 1000 ekzempleroj. Ĝiaj abonantoj estis la Esperanto-rondetoj kaj multaj aktivaj unuopuloj kaj ĝi servis ankaŭ kiel ŝatata informilo pri la enlanda Esperanto-movado eksterlanden.

## **TKKE**

Ĉiuj tri centroj de la aktiveco kuniĝis provizore en la kunveno de la delegitoj de Esperanto-rondetoj en Olomouc (1954), kaj definitive dum la Tutŝtata konferenco de esperantistoj-pacdefendantoj, iniciatita de la ĉeĥoslovaka MEM-sekcio (R. Burda), okazinta en la tagoj de la 7-a ĝis la 10-a de julio 1955 en Otrokovice (316 delegitoj el 90 lokoj). Tiam definitive konstituiĝis la TUTŜTATA KONSULTA KOMITATO ESPERANTISTA EN ĈSR – TKKE (*Celostátní esperantský poradní sbor – CEPS*) kaj estis elektita ĝia estraro en la konsisto: Josef Vítek (Praha) prezidanto, Miloš RUDOLF (Olomouc) sekretario, Rudolf BURDA (Plzeň) MEM-sekcio, Josef KOŽENÝ (Kutná Hora) organizaj aferoj, D-ro Tomáš PUMPR (Praha) lingvaj aferoj kaj Jaroslav MAŘÍK (Praha) Junulara sekcio. Samtempe konstituiĝis ankaŭ la slovaka sekcio, kies gvidanto Eduard V. Tvarožek el Martin fariĝis vicprezidanto de TKKE. La komitato transprenis la kunordigan funkcion inter la splitigitaj lokaj kaj ceteraj grupoj de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Certagradan idean kaj materian bazon disponigis al TKKE la Esperantista

Klubo en Praha per sia bulteno, kies speciala parto „TKKE INFORMAS“ fariĝis ligilo de la esperantistoj en la tuta lando. Malgraŭ ke TKKE ne havis oficialan aprobon, la ŝtataj organoj praktike respektis ĝian agadon kaj konsultis ĝin pri la aferoj de la Esperanto-movado. En la jaro 1956, la Ministerio de instruado kaj kulturo komencis trakti kun TKKE pri la starigo de la **landa** centro esperantista kaj komisiis la membrojn de TKKE funkcii kiel prepara komitato. Tiucele estis ellaborita projekto de statuto de la starigota landa centro (D-ro Pumpr ĉefe) kaj kunvokita tutŝtata konferenco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj por la tagoj 20-a kaj 21-a de oktobro 1956 al Olomouc. Sed tiu ĉi konferenco laŭ decido de la Ministerio estis poste prokrastita kaj ne plu efektiviĝis, ĉar la kondiĉoj por tio, flanke de tiamaj partiaj kaj ŝtataj organoj, ankoraŭ ne estis maturaj.

La aktiveco de la movado dum tiu ĉi etapo montriĝis en la famaj **Someraj Esperanto-Kolegioj en Doksy** – SKED (1946-1956), kiuj bedaŭrinde pro la malfavoraj personaj kaj teknikaj cirkonstancoj de Václav ŠPŮR – la ĉefa organizanto de SKED, en 1956 proksimiĝis al sia fino. Sekve de tio kreskis la signifo de la ĉiujaraj Someraj **Esperanto-Tendaroj en Lančov** – SET, organizataj de la Esperanto-klubo en Třebíč, kiuj montris daŭran progresan evoluon.

Elstaran rolon en la Esperanta kultura sfero dum la jaroj 1954-1959 havis la **teatra kolektivo „VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY“**, fondita fine de la jaro 1954 ĉe la Esperanto-klubo en Praha de Eva SUCHARDOVÁ-SEEMANNOVÁ kaj ŝia edzo Antonio SEEMANN. La kolektivo famiĝis per prezentadoj de multaj teatraĵoj, tradukitaj kaj originalaj, enlande kaj eksterlande (ekz. 1959 UK en Varsovio – „Pigmalion“). Sed tiu ĉi ĉapitro meritis specialan, pli ampleksan kaj konkretan pritakson.

### **La periodo 1958-1964: La 1-a ĈSEK**

Tamen la agado de TKKE kaj de la nomitaj ĉefaj aktivaj grupoj kun aliaj en Slovakio kaj de vico de kuraĝaj individuaj laborantoj, kiuj grandparte transiris la kadron kaj iam eĉ ne respektis la validajn normojn, disvolvita sekve de tio kun multaj malhelpoj kaj persona risko, estis tre meritplena. Ĝi pruvis la vivokapablon kaj socian utilecon de la esperantista movado.

Certagrada sukceso montriĝis en la jaro 1958, kiam laŭ decido de la Ministerio de lernejaferoj kaj kulturo, interkonsente kun la Centra Konsilantaro de Sindikatoj, estis nomita la unua **ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO** ĉe la Kleriga Instituto en Praha (ĈSEK), kiel konsulta, iniciata kaj kunordiga organo pri la aferoj de la internacia lingvo

Esperanto. La agado de la Komitato estis regulita per STATUTO, aprobita de la Ministerio pri lernejaferoj kaj kulturo. Per tio efektiviĝis almenaŭ la bazaj antaŭkondiĉoj por la oficiala agado de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado enlande kaj por la kontaktoj al eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj.

ĈSEK samtempe transprenis la kunordigan kaj organizan agadon, rilate al la lokaj Esperanto-rondetoj, de la antaŭa neoficiala TKKE, kies pluraj membroj fariĝis ankaŭ membroj de ĈSEK. **La konsisto de la Komitato:** PhDr. Jaromír JERMÁŘ (Praha) prezidanto, Adolf MALÍK (Praha) sekretario, Václav ŠPŮR (Doksy) kasisto; la ceteraj membroj: Josef AMBROŽ (Brno), MUDr. Ludovít IZÁK (Martin), Theodor KILIAN (Třebíč), Drahomír KOČVARA (Ostrava), Jiří KOŘÍNEK (Brno), PhDr. Magda ŠATUROVÁ (Bratislava).

**Rimarko:** Laŭ la Statuto de ĈSEK la komitato estis dekmembra. Komence de 1958 estis nomita kiel prezidanto de ĈSEK Adolf Malík kaj kiel sekretario Josef Vítek (Praha). Sed post la protestondo de Esperanto-rondetoj kaj de multaj individuaj aktivuloj kontraŭ Malík, kiu ĝenerale perdis la fidon de la esperantistaro, ĉefe pro la antaŭa sinteno al la likvido de la estinta EAĈSR, la Ministerio ŝanĝis la konsiston de la Komitato kaj nomis **D-ron J. Jermář prezidanto de ĈSEK**. Poste, J. Vítek estis devigita rezigni pri sia funkcio en la Komitato pro malprava kulpigo pri iu kontraŭleĝa ago. Fine de 1958 estis akceptita por kunlaboro en la Komitato František SVITÁK (Praha), kiu praktike plenumis la funkcion de sekretario.

Ekde 1959 la Komitato komencis la eldonadon de *ZPRÁVY – INFORMOJ de ĈSEK*, kiel de instrukcia bulteno por la funkciuloj de la Esperanto-rondetoj, agantoj ĉe diversaj klerigaj kaj kulturaj institucioj; redaktoro estis Jiří HAVLÍK (Praha). Pere de la *Informoj* la Komitato efektivigis la kontakton kun la Esperanto-rondetoj kaj la disvolvon de la kunlaboro kun ili. La *Informoj* aperis komence stecilitaj, tri- ĝis kvar-foje en la jaro, en la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj, sed poste (ekde la n-ro 8/1961) jam presitaj kaj grandparte en Esperanto, per kio ĝi povis servi ankaŭ al informado kaj kontaktoj kun la eksterlanda Esperanto-movado.

**La estraro** de ĈSEK sekurigis la laborefikon de la Komitato kun helpo de pluraj aktivuloj kaj **la plenkunsidoj** okazis alterne en diversaj urboj, plej ofte en la kadro de pli larĝa labor- kaj kultur-renkontiĝo, aranĝita de la loka Esperanto-rondeto (Přerov, Košice, Bratislava, Brno, Olomouc k.a.).

En la jaro 1959 ĈSEK organizis sukcesan **Someran Esperanto-Kolegion en Lázně Bělohrad** (ĉirkaŭ 100 partoprenantoj – provo pri la renovigo de

SKED), per sia aŭspicio ebligis la okazigon de ĉiujaraj **Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov**, organizataj daŭre de la Esperanto-klubo en Třebíč, kiuj kontribuis ĉefe al la senĉesa edukado de novaj, plejparte junaj adeptoj por la vicoj de la Esperanto-movado.

Ekde 1960, ĉiujare en somero, la Esperanto-rondeto en Poděbrady organizis, interkonsente kun ĈSEK, **Renkontiĝon de esperantistoj apud Elbo**, kiujn partoprenadis eĉ 150 esperantistoj el multaj lokoj, inter ili ankaŭ eksterlandanoj. Similaj **regionaj renkontiĝoj** okazadis regule dum kelkaj jaroj ankaŭ en Slovakio laŭ iniciato de la Esperanto-rondeto en Martin (Rajecké Teplice, Turčianske Teplice, Martin k.a.).

Kun helpo de la Kleriga instituto en Praha efektiviĝis, en sinsekvaj tri jaroj, **Tutŝtataj Esperanto-seminarioj** (1960 Štiřín, 1961 Frýdlant nad Ostravicí, 1962 Velké Meziříčí) por funkciuloj de la Esperanto-rondetoj kaj de la tiurilataj klerigaj institucioj kaj sindikataj kulturaj kluboj. Dum tiuj seminarioj estis pritraktataj, komune kun la reprezentantoj de ŝtataj instancoj, proponoj pri plibonigo de la kunlaboro kun la patronaj kulturaj institucioj, pri novaj labormetodoj kaj formoj. La seminarioj notinde kontribuis al plikresko de iniciatemo kaj plialtigo de la ideologie-organiza nivelo de la Esperanto-rondetoj.

En la jaro 1960, ĈSEK transprenis de Rudolf Burda en Plzeň la **agadaferon de la ĉeĥoslovaka MEM-sekcio** kun la partopreno je eldonado de la internacia **gazeto PACO**, po du ĝis tri ĉeĥoslovakaj numeroj ĉiujare. La PACON komence redaktis Josef AMBROŽ (Brno), poste Adolf MALÍK kaj la administradon transprenis Vladimír BOŘÁNEK (Plzeň).

ĈSEK fondis ankaŭ aliajn **fakajn sekciojn kaj komisionojn** surbaze de laboriniciato de pluraj aktivuloj (lingva prof. Theodor KILIAN, scienca D-ro Josef KAVKA, virina Jana CÍCHOVÁ, literatura Ing. Eduard FELIX, teknikista ark. Josef DRLÍK), kiuj helpis plenumi diversajn specialajn kaj fakajn taskojn. La sekcioj kaj komisionoj ligis ankaŭ certamezurajn kunlaboron kun la koncernaj internaciaj organizaĵoj.

Ekde 1962, la Ĉeĥoslovaka radio Praha enkondukis, laŭ kontrakto kun ĈSEK, regulan sesminutan **Esperanto-elsendon**, ĉiun lastan ĵaŭdon en la monato en la kadro de la elsendo por Aŭstrio. Poste la elsendo okazadis dufoje monate. La elsendojn redaktis Jana CÍCHOVÁ. En la sama jaro la Komitato kunlaboris ĉe la Monda ekspozicio de poŝtmarkoj PRAGA 1962 kaj je la eldono de **la unua ĉeĥoslovaka poŝtmarko kun Esperanta teksto** (Dolfa BARTOŠÍK).

Laŭ la iniciato de ĈSEK aŭ de unuopaj Esperanto-rondetoj kaj en kunlaboro kun la koncernaj sekcioj aŭ komisionoj **aperadis informaj**

**publikaĵoj pri ĈSSR**, ekzemple la broŝuro JUĜU MEM! – faktoj pri Ĉeĥoslovakio kaj la faldfolio ĈEĤOSLOVAKIO EN NOMBROJ – ambaŭ po du eldonoj, GVIDLIBRO PRAHA, plue MONOGRAFIO PRI BOŽENA NĚMCOVÁ, la dramo METEORO k.s. Pluraj Esperanto-rondetoj zorgis pri la eldonado de diversaj priurbaj, komercaj, kulturaj kaj kontraŭmilitaj publikaĵoj en formo de broŝuroj, flugfolioj, prospektoj, bildkartoj ktp.

Por la instruado de Esperanto, la Ŝtata pedagogia eldonejo post longa tempo denove eldonis (en la jaroj 1961 kaj 1964 po du eldonoj) **la lernolibron** de Theodor Kilian kaj **la poŝvortaron** de Rudolf Hromada. Sekve de tio notinde plikreskis **la nombro de Esperanto-kursoj** aranĝitaj de Esperanto-rondetoj tra la tuta lando.

Sur la organiza kampo ĈSEK **registris** ĉiujn aktivajn **Esperanto-rondetojn**, publikigis kaj kontinue precizigadis ilian adresaron, kio faciligis la reciprkan kontakton. La nombro de Esperanto-rondetoj rimakinde levigis, ĉar iliaj lokaj patronaj organizaĵoj konekse kun la funkciado de ĈSEK donis al ili pli grandan moralan kaj materialan subtenon (pli favora subteno rilate al sociutilaj aranĝoj, senpagaj klubejoj, financaj dotaĵoj k.s.). En la jaro 1963, en la adresaro de ĈSEK, estis jam 130 rondetoj kun ĉirkaŭ 3500 registritaj membroj.

La organiza, lingva kaj ideologia nivelo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado dum tiu ĉi periodo notinde firmiĝis. Bonan aktivecon montris precipe la rondetoj en Bardejov, Bratislava, Česká Třebová, České Budějovice, Gottwaldov, Košice, Olomouc, Opava, Ostrava, Poděbrady, Přerov, Svitavy, Teplice v Čechách, Třebíč kaj vico de aliaj, el kiuj la Esperanto-rondetoj en Brno, Hradec Králové, Martin kaj Praha eldonis **proprajn bultenojn** kaj la Esperanto-rondeto en Plzeň prizorgis la administracion de *PACO*.

**Internaciaj rilatoj:** ĈSEK multflanke enviciĝis en la internacian Esperanto-movadon per **proksima kunlaboro kun MEM** kaj kun la Esperanto-Asocioj de **socialismaj landoj**, aliflanke kun UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA) en Rotterdam. Kvankam ĈSEK ne sukcesis (ĉefe pro devizaj malhelpoj) membriĝi al UEA, evoluis bonaj kontaktoj kun ĝi per reciproka interŝanĝo de divesaj materialoj, ĉefe pri la aferoj organizaj. Samtempe UEA al limigita nombro de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj ebligis aliĝi al UEA, pagante la kotizojn en ĉeĥoslovakaj kronoj pere de la ĉefdelegito J. Ŝustr. Tiuj ĉi membroj de UEA ricevadis la oficialan organon *ESPERANTO* kaj la Jarlibrojn, per kiuj ili havis regulan kontakton kun la internacia Esperanto-movado kaj estis informataj pri ĝia evoluo.

**Delegitoj** de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj en la jaroj 1958-1960 partoprenis la **landajn kongresojn** de la Esperanto-Asocioj en Sofio, Varsovio kaj Tarnovo (Bulgario). Krom tio, je invito de la Sveda Esperanto-Federacio en la jaro 1959, D-ro Jermář plenumis **prelegvojaĝon pri Ĉeĥoslovakio en Svedlando**.

Rimarkinda estis ankaŭ la **partopreno ĉe internaciaj kongresoj**, ebligita plejparte de la Ministerio de lernejaferoj kaj kulturo:

1959 – la 44-a UK en Varsovio (tri oficialaj delegitoj – MLK kaj 40-membra turista grupo inkl. de la teatra grupo VERDA ĈARO de J. Baghy,

1961 – la Internacia kongreso d INEVKOM (virinoj) en Budapeŝto (unu oficiala delegitino – MLK),

1962 – la 47-a UK en Kopenhago (tri oficialaj delegitoj – MLK), Internacia kongreso de IFEF, Budapeŝto (tri oficialaj delegitoj – Ministerio de transporto),

1963 – la 48-a UK en Sofio (du oficialaj delegitoj – MLK kaj 43-membra turista grupo pere de ĈEDOK),

1964 – la 49-a UK en Hago (9-membra turista delegitaro), la 17-a landa kongreso de PEA en Łódź (kvin delegitoj-turistoj).

La ĉeĥoslovakaj delegitaroj en la kongresoj ĉiam vekis viglan intereson; ili dokumentis per sia ĉeesto la agadon de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado kaj utiligis la okazon por persona pritrakto de komunaj problemoj kun la delegitaroj de frataj socialismaj landoj. La unuaranga problemo tiurilate estis la strebo trovi la eblon de oficiala membriĝo precipe en UEA kaj tiel akiri plenrajtan postenon en la centraj internaciaj organizaĵoj.

Fone de la jaro 1963 kaj dum la jaro 1964, **la laboro de ĈSEK** sekve de organizaj kaj administraj malhelpoj, estis **tre malfortigita**. La plenkunsidoj ne plu estis kunvokataj, la aranĝado de regionaj kunvenoj per tio limigita kaj la budĝeto de la Komitato ĉe Kleriga Instituto por 1964 reduktita ĝis minimumo. La plimulto de la komitatanoj, ĉe kiuj **la finiĝinta agadperiodo ne estis renovigita**, ĉesis labori. Ankaŭ la prezidanto D-ro Jermář, kun protesto kontraŭ la pasiva kaj neglektema sinteno de tiamaj funkciuloj en la kompetentaj ŝtataj organoj, rezignis pri sia funkcio. – La nesufiĉa laboro de ĈSEK montriĝis ankaŭ en **malkreskanta agado de la Esperanto-rondetoj**, precipe en Slovakio, kie la plimulto de la rondetoj ĉesis labori.

La stagnantan agadon de la Komitato trenis – memkomprene kun egaj obstakloj – praktike nur la sekretario Inĝ. F. Sviták kun kelkaj libervolaj oferemaj aktivuloj (Jana Cíhová, Inĝ. Eduard Felix, Václav Tyráček, Oldřich Kníchal).

Ĉar la **Informoj de ĈSEK** pro la menciitaj malhelpoj dum tiu tempo aperis nur po unu numero jare (14/1963, 15/1964) kaj kun granda malfruigo, la nomitaj aktivuloj klopodis teni la kontakton kun la Esperanto-movado almenaŭ pere de stencilitaj cirkuleroj de komisionoj virina (J. Čichová) kaj literatura (Inĝ. Felix).

Malgraŭ tio la **sesjara agado de la unua Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato**, farita dum malfacilaj kondiĉoj, danke al kunlaboro de la agemaj Esperanto-rondetoj kaj de multaj **oferemaj lingvofakuloj** (ekzemple Rudolf HRMADA, D-ro Tomáš PUMPR, Miloš LUKÁŠ k.a.) alportis en la tuto **tre valorajn rezultojn**. Estis atingita bona organiza nivelo de la Esperanto-movado. La agado de la rondetoj kaj de unuopaj esperantistoj ĉiam celis pli la praktikan aplikon de Esperanto al porpaca internacia kunlaboro, al informado pri la disvolvo de socia kaj kultura vivo en ĈSSR kaj al konkretaj taskoj en la sfero de ekonomio kaj turismo. **Speciale gravaj estis la rezultoj en la eldona agado** kaj por la informado de la eksterlando kaj por la instruado de Esperanto enlande.

Do, ĝenerale, **estis kreitaj taŭgaj antaŭkondiĉoj por** la plua organiza kaj **pli kvalita disvolvo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado**. Tial ĈSEK en interkonsento kun la Kleriga Instituto faris jam fine de la jaro 1963 kaj dum la jaro 1964 aron da principaj sugestoj kaj proponoj. Samtempe estis prilaborita ampleksa detala kaj kritika analizo pri la kompleta stato de la Esperanto-movado por MLK kaj CK de KPĈ (aŭtoroj D-ro Jermář kaj Inĝ Sviták). En tiu ĉi direkto ankaŭ energie intervenis Augustín Čambál (gvidanto de la Esperanto-rondeto en Martin) kaj efike kunlaboris Tomáš Balda (Řevnice), kiu post relative longa tempo denove reaktiviĝis.

## **Periodo 1965-1968: La 2-a ĈSEK**

Rezulte de tiu ĉi strebado la Ministerio de lernejaferoj kaj kulturo decidis pri la instalo de **la dua ĈEĤOSLOVAKA ESPEANTO-KOMITATO** ĉe la Kleriga Instituto en Praha, kio okazis la 13-an de februaro 1965 en Brno. Membroj de la nova Komitato fariĝis grandparte novaj, sed pruvigintaj laborantoj de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado en **la konsisto**:

Inĝ. František SVITÁK (Praha) prezidanto, Augustín ČAMBÁL (Martin) vicprezidanto, Tomáš BALDA (Řevnice) sekretario, ceteraj anoj: Jana ČICHOVÁ (Praha), Zdeněk HRŠEL (Hradec Králové), Miloš HRUŠKA (Liberec), Drahomír KOČVARA (Ostrava), Michal KUCÍN (Košice), Vladimír LEHOTSKÝ (Bratislava), RNDr. Jaromír ŠIKULA (Brno).

La nomumo de la nova Komitato kaj ĝia longtempa agadplano estis publikigitaj per la eldono de **EKSTERORDINARAJ INFORMOJ de ĈSEK**. Laŭ la

agadplano, la tuta agado de la dua ĈSEK estis celita ĉefe **al plua mobilizo de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj** por aktiva kaj celkonscia laboro en koincido kun la interesoj de la socialisma sociordo, por la pacdefendo kaj interkompreniĝo de la popoloj. **La celo estis: krei kaj garantii la kondiĉojn al konstituiĝo de nova memstara Esperanto-Asocio!**

La aktiveco de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj en tiu ĉi etapo **denove notinde progresis**. La disvolvo de pozitiva agado kaj la ĝenerala membrokresko de Esperanto-rondetoj montriĝis speciale en Slovakio sekve de favora ŝanĝo en la sinteno de oficialaj organoj.

Estis fonditaj novaj sekcioj; temis precipe pri la **Sekcio de fervojistoj** sub la gvido de Bohumil KRÁL (Praha), kiu atingis ĉirkaŭ 800 membrojn kaj prezentis en la kadro de ĈSEK unu eron de la estinta laborista movado. Ĝi eklaboris celkonscie sur la reala bazo de Esperanto-rondeto ĉe la Kultura klubo en la Ministerio de trafiko. La dua, tre grava, estis la **Sekcio junulara**, gvidata de Mikuláš NEVAN (Praha), kiu fariĝis objekto de nia fiero kaj espero; dum mallonga tempo de du jaroj la sekcio disvolvis fervoran aktivecon, kies rezulto estis: du tutlandaj laborkonferencoj de la Esperanto-junularo (la unuan, 1966 en Praha, vizitis eĉ la prezidanto de UEA Prof. D-ro Ivo Lapenna), notinda nombro de memstaraj Esperanto-kursoj, aparta klubejo – oficejo kaj propra stencilita vivoplena bulteno *ZPRAVODAJ*. La sekcio kompilis provizoran ekzamenan regularon (aldono de ZPRÁVY n-ro 3-4/1966 kun tema vortareto laŭ Eduard Kühnl), ligis multajn internaciajn kontaktojn, efektivigis nombrajn eksterlandajn vizitojn. En la jaro 1967 kulminis la agado de la sekcio per la organizo de la 1-a internacia junulara Esperanto-seminario (IJES) en Borek apud Jílové. La junulara sekcio komence ĝuis plenan subtenon de ĈSEK, kiun ĝi poste multflanke kompensis per efika kaj oferema helpo dum plenumado de ĝeneralaj gravaj taskoj de la Komitato, precipe dum la jaro 1968 en la laborkampanjo por la starigo de nova memstara asocio. La sekcio dum tiu ĉi etapo kolektis ĉirkaŭ 700 registritajn junajn membrojn.

Sinsekve eklaboris la preparokomitatoj de **pluaj sekcioj: instruista, teknikista kaj kuracista**, kiuj disvolvis organizan agadon celantan al definitiva konstituiĝo.

Eksterordinare valorajn sukcesojn akiris la MEM-sekcio sub la sperta gvido de Tomáš BALDA, kiu ligis rektan kunlaboron kun Ĉeĥoslovaka komitato de pacdefendantoj kaj kontaktis ankaŭ Tutmondan packonsilantaron, fariĝinte sekretario de la centra komitato de MEM. La ĉeĥoslovakaj eldonoj de la internacia gazeto PACO, redaktitaj ekde 1964 de Čestmír KNOBLOCH kaj ricevintaj daŭre financon subtenon flanke de la

Kleriga Instituto, fariĝis reprezenta revuo. Aperadis po du ĉeĥoslovakaj eldonoj ĉiujare, en amplekso ĝis 40 paĝoj, kiuj ĝuis tre bonan aprezon kaj enlande kaj eksterlande pro la alta nivelo enhava kaj grafika. La nombro de la ĉeĥoslovakaj MEM-anoj abonantoj kreskis ĝis 600. Tiu ĉi bona evoluo bedaŭrinde estis bremsita en 1968 per grava malfruiĝo de la ĉs. eldonoj kulpe de la presejo (Ŝtata presejo, n.e., entrepreno 2, Praha 2).

**La presorgano** de la Komitato *INFORMOJ de ĈSEK* sub la redaktado de D-ro Ľudovít IZÁK (1965-1968) tamen aperadis, malgraŭ granda malfruiĝo, en la presejo TSNP, Martin, laŭplane **po kvar numeroj kun literatura aldono** ĉiujare (escepte 1968 nur du numeroj).

**Rimarko:** La enkonduko de abonpago, de 1966, kun la intenco ebligi la ricevadon de la gazeto por ĉiuj interesatoj, ne alportis la dezirindan sukceson (oni atingis maksimume 900 abonantojn), ĉar la esperantistoj malkutimiĝis pagi kotizojn kaj ĉar la aperado de la „informoj“ ne estis regula.

Sub la aŭspicio de la Esperanto-rondeto en Martin D-ro Izák redaktis kaj regule eldonadis ankaŭ stencilitan gazeton ***Esperanto-Agado***, de la jaro 1968 deove sub la tradicia titolo ***Esperantisto Slovaka***.

**En la cetera publikiga agado** oni sukcesis, laŭ la iniciato de redaktoro Ĉestmír Knobloch kaj danke al komprenemo de multaj Esperanto-rondetoj kaj unuopuloj, enkonduki **Esperanto-rubrikon** en la kultura gazeto de Ministerio pri kulturo kaj informado *NEDĚLE* (redaktis O. Kníchal kaj J. Vítek); analogie en la jaro 1968 en la slovakaj gazeto *NEDEĽA* komencis aperadi esperanta RUBRIKO EN PLI GRANDA AMPLEKSO (RED. P. Rosa). Esperabtaj rubrikoj kaj kursoj estis poste sinsekve enkondukitaj en la junpionira gazeto *Pionierske noviny* kaj en la organo de slovakaj junularo *SMENA* (ambaŭ en Bratislava), en la regionaj gazetoj *SMER* (B. Bystrica) kaj *Východoslovenské noviny* (Košice). En la revuo de Slovaka akademio de sciencoj *SVET VEDY* aperadis scienca priesperanta tribuno, en la gazeto *Umelecke slovo* tutpaĝa rubriko kun ekzempleroj de Esperanta beletro; en la regiona gazeto *Jihočeská pravda* kaj aliaj, ankaŭ en uzinaj gazetoj kaj t.n. kulturkalendarioj de pluraj urboj aperadis regulaj Esperanto-rubrikoj.

La publika presado, ekzemple *Rudé právo* kaj aliaj ĵurnaloj kaj gazetoj, publikigis ĉiam pli ofte sufiĉe multajn informojn kaj iom pli longajn artikolojn pri Esperanto aŭ ekzemplojn pri la agado de la Esperanto-agado.

La ŝtata eldonejo ORBIS eldonis (1967) belan informan broŝuron sub la titolo ***Mallonge pri Ĉeĥoslovakio***, kies eldonkvanto estis parte dediĉita

al la eksterlandaj abonantoj de *PACO*. ORBIS laŭ la antaŭa plano eldonis ankaŭ **bildkartojn kun kolora mapo de ĈSSR**.

Kiel ekstra represo el la gazeto *PACO* aperis: **Franca arto** en Nacia galerio en Praha; ĝi estis grandparte sendita al Esperanto-organizaĵoj en Francio kiel amika kultura donaceto. Analogie aperis represo de la **Bapto de caro Vladimiro** en la traduko de D-ro Pumpr kaj grava informa broŝuro **Kio estas MEM** (*Co je to MEM*), kun la spritaj, kontraŭmilitaj ilustraĵoj. En la propra eldono de ĈSEK aperis la broŝuro **Co nevíte o esperantu** (Kion vi ne scias pri Esperanto), de O. Kníchal – valora informaĵo pri la internacia lingvo, precipe por la interesatoj, novaj esperantistoj, sed same por pli vasta publiko, eventuale kiel dokumento por diversaj aŭtoritatoj. En la jaro 1968 aperis ankaŭ, en la eldonejo OLYMPIE, la longe atendata, tre bela ilustrita publikaĵo **INVITO AL ĈEĤOSLOVAKIO**. Ankaŭ ĝi estis donacita kiel premio al ĉiuj abonantoj de *PACO* kaj la resto estis rezervita por la tiam planita 4-a Spartakiado en Praha. Danke al komprenemo de la Kleriga Instituto en Praha, la publikaĵoj estis financitaj el la budĝeto de ĈSEK ĉe KI. Ĉiuj estis kaj parte restis je dispono por la venontaj jaroj en la enlanda merkato.

La eldonejo DILIZA (Bratislava) aperigis la teatraĵon **MOHAJRA PLEJDO** en la traduko de Eduard V. Tvarožek.

En la sfero de lernohelpiloj la Esperanto-klubo en Třebíč eldonis proprakoste vortareton de **808 plej ofte uzataj vortoj** kaj bazan **lernolibreton ABC** de prof. T. Kilian, kiuj estis destinitaj por la kursoj en SET Lančov; pro manko de lernolibroj ili estis uzataj ankaŭ en la kursoj de Esperanto-rondetoj. Similmaniere helpis solvi la bezonon ankaŭ la Esperanto-rondeto en Vsetín per eldono de kompletaj lernotekstoj (aŭtoro Aleš Berka). Sur tiu ĉi kampo montris grandan aktivecon la slovakaj esperantistoj en Bratislava, kiuj pere de la ŝtata pedagogia eldonejo aperigis sinsekve **la konversacion** de D-rino Magda Šaturová, **bazan lernolibron** de D-ro F. Šatura kaj P. Rosa kaj por la presado preparis **grandan vortaron** de Štefan Seemann. – En la Ŝtata pedagogia eldonejo Praha aperis **la 3-a eldono de la lernolibro** de Th. Kilian kaj **la 3-a eldono de la poŝvortaro** de R. Hromada.

Rimarkindan signifon por la vigligo de la Esperanto-movado kaj ĝia popularigo en la jaroj 1965-1966 havis **la subskrib-kampanjo de UEA** por la propono favore al Esperanto, prezentita **al UNO en la kadro de „la jaro de internacia kunlaboro“**. Danke al parto de Esperanto-rondetoj kaj ĉefe al oferemaj unuopaj organizantoj kun la ĉefdelegito de UEA Jaroslav Šustr ĉe la frunto, la kontribuo de ĈSSR en tiu ĉi kampanjo estis notinde grava.

El inter la plej fervoraj kolektantoj de subskriboj ni menciuj almenaŭ Standi Čáp, Jaroslava Míčová kaj la Junularan sekcion.

Multaj el niaj Esperanto-rondetoj en tiu ĉi periodo laboris tre bone kaj organizis en kunlaboro kun ĈSEK plurajn iom grandajn aranĝojn. La plej gravaj estis:

- La tutŝtata konferenco de Esperanto-rondetoj 1965 en Olomouc, kiun partoprenis la gvidantoj de Esperanto-rondetoj kaj ankaŭ reprezentanto de la Ministerio pri lernejoj kaj kulturo.
- La menciitaj **tutlandaj konferencoj de la Junulara sekcio 1966** en Praha kaj Olomouc.
- La daŭran signifoplenan taskon por la disvolvo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado plenumis la tradiciaj **Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov**, ofereme aranĝataj de la Esperanto-rondeto ĉe la Kleriga domo en Třebíč, kiu ekde 1967 komencis eldonadi specialan neregulan **bultenon SET-ano**.

La jaro 1967 estis jaro de gravaj internaciaj kaj enlandaj eventoj, kiel ekzemple: La 50-a jubileo de Granda oktobra socialisma revolucio, Internacia jaro de turismo, la 100-jara datreveno de la naskiĝjaro de nacia artisto Petr Bezruč; inter ili estis ankaŭ **la 80-jara jubileo de Esperanto**. Tiuj ĉi jubileoj kaj kampanjoj prezentis tre bonajn kondiĉojn kaj okazon por vasta aplikado de la internacia lingvo Esperanto en la informado, interŝanĝo de kulturaj valoroj kaj por multspecaj pruvoj pri ĝia utileco en la tutsociaj internaciaj rilatoj.

Sekve de tio okazis tra la tuta lando kvazaŭ inundo da iom grandaj aranĝoj. Inter ili al la plej gravaj apartenis:

- Tutŝtata konferenco de la fervolista sekcio de ĈSEK en Praha (80 delegitoj),
- Renkontiĝo kaj seminario **Plzeň 1967** kun internacia partopreno (300 partoprenintoj),
- Esperantista kulturfestivalo **Opava 1967** omaĝe al la 100-jara jubileo de P. Bezruč – la ĉefa kaj publika aranĝo kun internacia ĉeesto (350 partoprenintoj),
- 1-a internacia junulara esperantista seminario (IJES) en Borek apud Jílové (kunlabore kun TEJO),
- Regiona konferenco de slovakaj esperantistoj en Bratislava,
- Konferenco de la Junulara sekcio kaj renkontiĝo de esperantistoj en Dudince,
- Regiona renkontiĝo de esperantistoj en Pardubice.

**En la sfero de internaciaj rilatoj** ĉeĥoslovakaj esperantistoj partoprenis:

1965 – du delegitoj-turistoj ĉe la 50-a jubilea UK en Tokio.

Kelkaj delegitoj ĉe la Eŭropa Esperanto-konferenco en Vieno.

1966 – ĈSEK organizis amasan vojaĝon al la 51-a UK en Budapeŝto; ĉi tiun UK partoprenis ĉirkaŭ 500 ĉeĥoslovakaj delegitoj, inter kiuj estis multaj, eĉ malnovaj membroj kaj funkciuloj, kiuj ĉeestis UK la unuan fojon en sia vivo.

1967 – ĉe la 52-a UK en Roterdamo kaj

1968 – ĉe la 53-a UK en Madrido partoprenis notinda nombro de ĉeĥoslovakaj delegitoj kiel individuaj turistoj aŭ je la invito de eksterlandaj amikoj.

ĈSEK zorgis ĉiuokaze almenaŭ pri tio, ke la komisiita delegito prezentu sin kiel salutanto de la kongreso en la nomo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado.

Krom tio disvolviĝis preskaŭ **amasa vojaĝado de ĉeĥoslovakaj esperantistoj eksterlanden** kaj rimarkinde multiĝis ankaŭ vizitoj de eksterlandaj samideanoj en nia lado.

Grava internacia kultura evento en 1965 estis la invito al la ŝtata **Pola popola teatro el Łódź**, kiu prezentis en Esperanto la dramon de S. Vincenberg *KATAKI* en la teatro de S. K. Neumann en Praha por 400 esperantistoj.

En tiu ĉi entuziasma agado kaj ĉefe en la plejparte seriozaj konkretaj rezultoj estis videbla la **granda vivkapableco de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado**.

Samtempe ĈSEK interkonsente kun la Ministerio de kulturo kaj informado organizis preparojn por **ampleksa kaj detala analizo** pri la evoluo, laboro kaj signifo de la Esperanto-movado (komisiono sub la gvido de T. Balda) kaj konekse kun ĝi preparis **projekton de la statuto por nova ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio** (faka komisiono gvidata de D-ro T. Pumpr). Ĉi tiuj dokumentoj fine de la jaro 1967 estis prezentitaj al la Ministerio de KI kaj al la Ministerio de internaj aferoj. Ambaŭ dokumentoj fariĝis objekto de pluraj personaj traktadoj, kiujn lanĉis la reprezentantoj de ĈSEK kaj de la Kleriga Instituto en Praha. La solvo estis prokrastita pro tio, ke oni antaŭvidis baldaŭan aprobon de nova leĝo pri la societaj kaj interes-organizaĵoj.

**Januaro 1968**, kun la gravaj ŝanĝoj en la superaj politikaj kaj ŝtataj organoj, alportis por la Esperanto-movado pli favorajn kondiĉojn kaj

akcelis la efektivigon de la plano pri la konstituo de nova memstara Esperanto-Asocio.

Konekse kun la preparoj por federacia ŝtata sistemo de ĈSSR okazis en majo (Brno) **komuna interkonsiliĝo de ĈSEK** kaj de la **Konsulta komitato por Esperanto kaj Esperanto-rondetoj ĉe la Kleriga Instituto en Bratislava** (fondita komence de 1968), dum kiu estis interkonsentita plua procedo kaj **nova prilaboro de statut-projektoj surbaze de federaciaj principoj** (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Asocio de Esperantistoj en SSR kaj Ĉeĥoslovaka Esperanto-Federacio).

La kontraŭrevolucia evoluo en nia lando okazanta dum la jaro 1968 kaj la alveno de aliancaj armeoj de socialismaj landoj en aŭgusto influis negative la organizajn aferojn de la Esperanto-movado:

- Konkretaj preparaj laboroj por la aprobo de la statutoj de novaj asocioj kaj ilia konstituiĝo estis prokrastitaj.
- Same **oni ne povis organizi** la planitan ĉefan aranĝon de la jaro – **Semajnon de Internacia Amikeco en Plzeň**, kiu estis preparita en kunlaboro de la internacia komitato de MEM.

Malgraŭ tio estis organizitaj pluraj **sukcesaj aranĝoj**:

- Somera Esperanto-Tendaro en Lančov (la 16-a), kiu atingis po 150 partoprenintoj en abau etapo, inkluzive de eksterlandaj gastoj.
- Renkontiĝo de esperantistoj apud Elbo en Poděbrady, ligita kun internacia turniro de ŝakistoj-esperantistoj.
- Renkontiĝo de esperantistoj el tri landoj (ĈSSR, GDR, PLR) en Jablonec nad Nisou.
- Someraj Esperanto-lernejoj en Piešťany kaj Prievidza.

Al signifoplenaj sukcesoj apartenis la finstudo de la teatraĵo *MANON LESCAUT* (de V. Nezval) fare de Silezia teatro en Opava kaj ĝia prezentado okaze de la internacia festivalo en Pula (Jugoslavio) kaj en la Esperanto-renkontiĝo en Jablonec;

- Fondo de Slovaka Esperanto-Societo ĉe Slovaka Akademio de Sciencoj.
- Enkonduko de Esperanto-elsendoj ĉe la ĉeĥoslovaka radio en Bratislava.

**La nombro de aktivaj Esperanto-rondetoj**, kiu dum portempa stagno (dum 1964) malleviĝis, laŭ la centra registro de ĈSEK **fine de la jaro 1968** kreskis denove ĝis 140 kun ĉirkaŭ 3 600 registritaj membroj.

La Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, en kies laborestraron estis akceptita **Josef Víték** (Mělník) kiel sekretario kaj **la preparkomitato de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, fondita en julio 1968 sub la gvido de **Jaroslav Mařík** (Praha), daŭrigis la necesajn preparlaborojn kaj traktadojn kun la

kompetentaj ŝtataj organoj pri aprobo de la **finredaktita Statuto**. – En tiu ĉi strebado ĝuis niaj Esperanto-organoj **plenan komprenemon de la funkcioj de la Kleriga Instituto** (precipe de Jiří Pondělíček) kaj ĝia direktoro D-ro Miroslav Bukovský, kiuj dediĉis al nia afero notindan moralan, fakan, financon kaj personan subtenon.

Sekve de tio oni povis dum la tuta jaro informi kaj mobilizi la Esperanto-rondetojn kaj ĉiujn esperantistojn al senĉesa aktiveco pere de la *INFORMOJ DE ĈSEK* kaj apartaj cirkuleroj (*Informace*). Fine de la jaro komencis aperadi **nova stencilita gazeto STARTO**, kiun redaktis Oldřich KNÍČHAL kaj pretigis Mikuláš NEVAN kun la anoj de Junulara sekcio. *STARTO* funkciis dume kiel organo de la preparokomitato de ĈEA. – Samtempe komenciĝis la preparoj por multaj organizaj aranĝoj kaj de necesaj kongres-dokumentoj.

La tuta penoplena kaj ampleksa, sed ĝojiga kaj fervora agado de ĉiuj nomitaj organizantoj en kunlaboro kun la agopretaj Esperanto-rondetoj kulminis en la aprobo de la Statuto pere de la Ministerio de internaj aferoj en januaro 1969 kaj **kunvoko de la konstitua kongreso de ĈĤA ESPERANTO-ASOCIO** (marton 1969 en Brno).

*Praha, la 11-a de junio 1971 – František Sviták  
Decembre 1971 lingve korektis Jaroslav Mařík*